



Esperanto 80

# Okdek-anoj Ĉe l' Papero

Nova eldono 2005 • n-ro 16a

La gazeto de la membroj de l' asocio Esperanto 80

Aprilo kaj Majo – Avril et Mai 2005

Le journal des membres de l'association Esperanto 80

**Réunions conviviales!  
Gastaj kunvenoj!**

## Réunion Conviviale – Gasta kunveno

**N'oubliez pas de venir**

à la réunion conviviale qui aura lieu :

**le Vendredi 6 mai 2005 dès 19h30, salle des Tilleuls  
à Salouël (derrière la Mairie).**

Surtout n'oubliez pas de téléphoner à Daniel au 03 22 47 30 11 : **avant le mercredi 4 mai 2005 au soir. À noter: la réunion conviviale suivante aura lieu le vendredi 3 juin 2005.**



## Connaissez-vous le nouveau PIJ? Ĉu vi konas la novan PIJ?

Non, ne vous méprenez pas, il n'est pas ici question du PIV (Plena Ilustrita Vortaro – Dictionnaire Illustré Complet), mais du PIJ pour le «Plena ilustrita Ĵurnalo», c'est-à-dire en français, le Journal Illustré Complet.

Alors le connaissez-vous? Non?

Hé bien vous l'avez devant les yeux: ce seizième numéro de Okdek-anoj ĉe l' papero! En effet les activités récentes de l'association on rendues prolixes les images.

Ce numéro, vous le noterez, regroupe les mois d'avril et de mai. Par contre il vous sera envoyé en deux fois, d'abord celui-ci que vous êtes en train de lire: c'est la partie on va dire «classique» du journal, en 4 pages, puis un supplément que j'enverrai plus tard qui traitera entres autres de Boulogne 2005.

Au programme cette fois-ci, vous trouverez page 2 et 3 les éléments consécutifs à la venue de Madis Linnamägi en France et plus particulièrement intéressant pour nous à Amiens.

Un article est paru dans le «Courrier Picard» écrit par Jean Vimeux correspondant local. Ensuite vous trouverez le résumé avec renfort de photos des activités réalisées lors de la présence de Madis. Découvrez, dans le suite de la page 3, ce qu'est un Forum Social Local, tel que celui qui a eu lieu à Amiens il y a tout juste une semaine. Vous verrez sur la photo Daniel content de découvrir que les jeunes se tournent naturellement vers l'Espéranto sans préjugés et emplis de curiosité et de sincérité.

N'oublions pas les brèves en page 4.

Ne, ne miskomprenu, ne temas pri la PIV (Plena Ilustrita Vortaro), sed pri la PIJ t.e. la «Plena ilustrita Ĵurnalo».

Ĉu vi konas ĝin? Ĉu? Ne?

Nu, vi havas ĝin antaŭokule: ĝi estas tiu ĉi 16a numero de Okdek-anoj ĉe l' papero! Jes ja, freŝdataj okazintaĵoj kaj agadoj de la asocio multobligis bildojn.

Tiu ĉi numero estas dumonata ĵurnalo per grupigo de tiu de aprilo kaj tiu de majo.

Tamen, bone notu, ke ĝi estos sendita al vi per du sendoj. Unue tiu ĉi sendo, kiun vi estas leganta: la kora 4-paĝa parto de la ĵurnalo kaj poste mi sendos al vi suplementon, kiu temos interalie pri Bulonjo 2005.

Vi trovos ĉi-foje, ĉe la paĝoj 2 kaj 3 atesto-elementoj post veno de Madis Linnamägi en francion, kaj por ni pli substrekinde en Amienon.

Artikolo, verkita de Jean Vimeux, aperis en la «Courrier Picard». Poste vi trovos resumon, kun lavang-pleno da fotoj, pri la agoj okazigitaj dum ĉeesto de Madis.

Malkovru, en sekvo de la tria paĝo, kio estas Loka Socia Forumo, kia, tiu okazinta en Amieno antaŭ nur unu semajno. Vi vidos foton de Danielo kontenta malkovri, ke junuloj turniĝas tute nature al Esperanto, sen antaŭjuĝoj, kun scivolemo kaj sincero.

Ni ne forgesu okulumi al la mallongaj informoj ĉa la paĝo 4a.

Cyrille

Cyrille

# Venis, vidis, ~~venkis~~ scivolis Madis\*

\* Kompreneble, ĉar Madis ne venis kiel militisto, sed kiel perEsperanta scivolema pac-homo por malkovri Francion kaj malkovrigi al ni sian landon, Estonio.

## L'Estonie en espoir et esperanto

Lors d'une conférence donnée en estonien et en esperanto c'est un tout jeune pays européen peu connu qui a été présenté au public par Madis Linnamägi.

Invité de l'association *Esperanto 80*, Madis Linnamägi, a présenté son pays l'Estonie, un tout jeune pays européen qui, libéré du joug soviétique, a en quelques années fait le « Bond du tigre » (Tiigrihüpe<sup>(\*)</sup>), pour s'inscrire pleinement dans le XXI<sup>e</sup> siècle.

Il n'y avait pas beaucoup de monde à cette conférence, une quinzaine d'auditeurs au plus, soit pratiquement la totalité des *esperantistes* de la métropole amiénoise. Pourtant le sujet en valait la peine.

Madis Linnamägi ne parle pas français, Jean-Claude Roy, le président d'*Esperanto 80* ne cause pas Estonien.


Une traduction alternée *esperanto* et français a donc permis d'en savoir plus sur ce petit pays de 1 350 000 habitants, situé le plus au nord des pays baltes où les jours les plus courts durent 6 heures et les plus longs 19 heures.

Soixante-dix pour cent de la population habitent dans les villes. Le territoire, avec 45 227 km<sup>2</sup> est plus grand que la Hollande. La trentaine d'habitants au km<sup>2</sup> cohabite avec 300 ours bruns et 400 loups.

### Une destination peu prisée par les Français

Il est vrai qu'avec 70 % d'urbains dont plus de la moitié habite la capitale Tallinn, les espaces sont immenses et qu'ours, loups et hommes ont très peu l'occasion de se gêner.

En été, les grandes plages de sable fin voient progresser d'une manière fulgurante le flot des touristes,



À gauche, Madis Linnamägi, *esperantiste*, parcourt actuellement la France pour y faire la promotion de son pays.

venant essentiellement de Finlande, de Suède, Norvège et Danemark. S'ajoute aussi un mode de vie, où l'on ne se passe pas du saunas et des massages.

Sûrement une belle destination, assez peu prisée des Français à la recherche du soleil. « Les Français viennent souvent chez nous pour chasser l'ours », explique Madis Linnamägi.

État souverain depuis 1992, de 2,6 millions en 1997, la population de touristes en 1997 est passée à 3,2 millions en 2001. Et pour faciliter les échanges, l'Estonie adoptera l'Euro le 1er janvier 2007.

De notre correspondant local  
JEAN VIMEUX

est le nom donné au programme gouvernemental pour généraliser la pratique de l'ordinateur. Les bases acquises à l'école, obligatoire de 7 à 18 ans, en technologie de l'informatique sont un atout pour l'avenir.

\* Contact *Esperanto 80*: Daniel Devis,  
6 rue des Fauvettes à Cagny. Tél. 03  
22 47 30 10. Mail :  
ddevis@wanadoo.fr

(\*) Tiigrihüpe - Le bond du tigre.

### Madis en Pikardio

Madis Linnamägi restis kelkajn tagojn en nia regiono. Jen fotoj pri lia ĉeestado.

La unuan tagon li alvenis el Plouézec (en Bretonio). Akceptis lin membroj de *Esperanto 80* kaj gastigis lin Sylvain Esteves. La saman tagon okazis *vespermanĝo* en la ĉambro «Jean Jaurès». Estas emfazinda la ĉeesto tiun vesperon de Jean Vimeux, la *jurnalisto*, kiu raportis en la «*Courrier Picard*» (vd. ĉi-supre), kaj virino estona laboranta por Eŭropa oficejo en Amieno.

Li vizitis Amienon ties katedralon kaj ties aliajn interes-



Madis, *scivolema homo*, estas foto-frenezulo. Li uzas sian fotilon, kiel bild-notilon.

aĵojn kun Bernadette kaj Maryse la postan tagon.

Madis la vesperon de tiu tago prelegis en la ĉambro «Jean Jaurès» pri sia lando.

La postan tagon ni (Madis, Cyrille, Maryse, Bernadette kaj Christiane – amikino de *gedzoj* Devis) iris al la pikarda marbordo.



Madis travivonta «ekzotikan» sperton t.e. manĝaĵo el mituloj kun terpomfritoj.

En Fort-Mahon ni kun manĝis *restoracio* staranta tuj apud la marbordo. Tie ni gustumis



mitulojn kun *terpomfritoj*, ĉar en Norda Francio (kaj en Belgio) tiu manĝaĵo estas tute tradicia kaj eĉ komuna, sed por Madis tio estis tre stranga, eksterordinara manĝaĵo pri kiu li eĉ uzis la a-vorton «ekzo-

Paŝado postmanĝa ĉiam bonvenas!

Paŝas Maryse, Madis, Bernadette kaj Christiane.

tika». Kompreneble se ni irus al Estonio, ni povus travivi tiajn ekzotikajn manĝospertojn, sed alimaniere.

Post tagmanĝo ni disiĝis: Maryse kaj Christiane iris siaflanken, kaj Bernadette kaj mi montris al Madis la belon de la Pikarda regiono.

Ni vizitis *Saint-Quentin du Tourmont*, en kiu ni haltis. Ni vidis interalie heliko-bredejon, sed ĝin ni ne vizitis. Poste ni haltis sur placo antaŭ urbo-domo de la vilaĝo.

Tiam ni eniris en la akceptejon de la urbo-domo, kie deĵoris afabla sekretariino. Ĉe muro de la akceptejo Madis vidis afiŝon pendantan. Ĝi estis afiŝo pri la francaj prezidentoj de la Respubliko de l' komenco de la Respublikoj ĝis nia nuna prezidento Ĵak' Ŝirak'.



Preskaŭ ne plu havanta eblecon fotografii, Madis volis, ke mi fotu ĝin por li. Mi grimpis sur seĝon por pli bone atingi ĝin kaj fotis.

La urbo-domo staris apud karakteriza domo. En tiu domo loĝas maljuna paro, kies edzino kolektas freneze etetajn oleo-lampojn kaj edzo malnovajn farmilojn. Ni fotis plu.



En *Saint-Quentin du Tourmont*, antaŭ la domo de la maljuna paro.

Poste ni trairis arbaran ĉirkaŭaĵon de la *Marquenterre* (fama rezerv-parko por birdoj). Tie ni vidis kaj fotis la belajn kaj famajn ĉevalojn lokajn: la *Hanson*-ojn.



Madis antaŭ ĉevalo *Hanson*-o.

Poste ni vizitis *Le Crottoy*, en kiu staras la malnova domo de Jules Verne. Intertempe ni vizitis la malnovan ĉina tombejo en vilaĝo apuda kaj iris al *Saint-Valéry*. En tiu urbo fame konata, ni paŝis al preĝejo de la maristoj. Pli kaj pli noktiĝis kaj ni decidis iri retroen al la domo de la geedzoj Devis, kie ni trapasos la nokton venontan. Antaŭ reveno al

la domo, ni decidis pasi tra la urbo Rue, en kiu staras fama kaj fortika konstruaĵo. Noktis, sed bela estis la lumigo de la urbo!! Tie Madis petis al mi foti la kokon. Tio estas koko sur respublika mortomonumento pri la du mond-militoj. Madis deziris, ke mi fotu ĝin, ĉar li planis eldoni libron pri tiaj simboloj. Fakte oni ne nun jam scias, sed en *Wimereux* apud Bulonjo-ĉe-Mar, li trovos pli bel-aspektan kokon...



Se en tiu ĉi foto vi povas vidi kokon... mi gratulas vin, ĉar tiu ĉi koko tre stangas!

Ni rendezuis en la *rue du trou au loup*, kie sidas la domo de Daniel kaj Maryse.



Jam atendis nin Daniel, Maryse, Christiane, sed ankaŭ Luc kaj Françoise Jaisson kaj Françoise Lemonnier. Ni vespermanĝis kaj enlitiĝis ne tro malfrue, ĉar mi kaj Madis jam planis iri Bulonjen por vizitadi Simpozion okazontan de UEA en la Bulonja universitato.

Cyrille

## Esperanto 80 kaj amikoj en la LSF



### Esperanto 80 en la Loka Socia Forumo

Sociaj Forumoj naskiĝis pro bezono fariĝi renkontiĝ- kaj interŝanĝ-lokoj por aktivuloj, kiuj kontraŭas diktatorajn ekonomiajn potencul-strebojn. Aktivuloj havantaj samajn ideojn aspiras kaj strebantaj al pli justa kaj demokratia mondo kunigas en grandan eventon por agordiĝi pri la celoj, la manieroj agi, kaj tiel interŝanĝi ideojn kaj travivaĵojn. Ĉio tio komenciĝis antaŭ kelkaj jaroj en Brazilo, en la urbo *Porto-Alegre*, kaj de tiam ĉiujare okazas mondskala evento lastan jaron en *Mumbajo* en *Bharato* (hind-devenaj nomoj

de Bombay kaj Hindio). Ankaŭ kontinent-skale okazas tiaj eventoj. Ekzemple en novembro 2003, okazis en Sankta-Denizo (Saint-Denis, 93) apud Parizo, Eŭropa Socia Forumo, en kiun venis miloj da personoj. Sed post ekesto de mond- kaj kontinent-skalaj eventoj ankaŭ ekzistas lokaj tiaj eventoj. Tiujn ĉi eventojn lokajn oni nomas Lokaj Sociaj Forumoj kaj konkretigas ĝispinte la esprimon «Pensi tutmonde, agi loka». Unu el tiuj lastaj forumoj okazis en Amieno inter la 25-a kaj la 30-an de aprilo 2005. Multaj renkontiĝoj, koncertoj, prelegoj okazis. La lastan tagon la organizintoj starigis budojn sur la placo «Colvert» en kvartalo «Le pigeonnier», en Norda Amieno. Esperanto 80 havis eblecon deĵori per budo, kaj tien ni venis kaj ja deĵoris. Daniel kaj Cyrille rendezuis tie, sed ne tuj trovis sian lokon pro nepolurita organizado. Finfine organizintoj starigis tablojn kaj montris seĝojn. Poste alvenis Jean-Claude kaj ni surtabligis librojn, revuojn kaj fotokopiitaĵojn dokumentojn. Pasis Bernadette, ties bo-fratino, Nelly kaj amikoj. Ankaŭ

ĉeestis Françoise Lemonnier, Françoise Maréchal kaj frato de Albert por la SEL. Ankaŭ havis budon la asocio «Eplug», asocio pri la liberaj programaroj en kiu membras (la) filo de Bernadette. Almenaŭ en la komenciĝo de la posttagmezo, ne impona homamaso ĉeestis, krom kelkaj petolemaj kaj perbicikle perturbantemaj buboj. La bubojn interesis precipe bildostrioj en Esperanto, ekzemple unu Asteriks, la nova Tinĉjo en Tibeto kaj La Flambirdo, esperanta traduko de japan-devena bildostrio. Unu el la buboj okulumis al La Flambirdo, dezirante eĉ ŝteli ĝin, provante kaŝi ĝin en pantalonen. Tamen mi havis plezurojn: infanoj (ne plu buboj) deziris legi bildostriojn en Esperanto kaj scii pri la nomo de la lingvo uzata en la libroj (ĉu hispana?). Kelkaj legis tute simple la lingvon post elementa klarigo, preskaŭ pli facile ol la francan. Unu el ili (vidu la foton) venis por legi dum longaj minutoj kaj revenis plurfoje, petante Danielon pri traduko de la legataĵo. Infanoj ja estas senantaŭjuĝaj!

Cyrille

# Mallonge – En bref

## Malnova sed plu aktuala mesaĝo de Vincent Courouble

En Esperanto: Mi permesas skribi al vi por remorigi ke la Esperanta klubo de Beauvais kutimas kuniĝi ĉiun kvaran Vendredon monate en la asocia kafejo «L'Écumé du jour» (rue du Faubourg Saint Jacques) ekde la 20a, por diversaj celoj:

- ekkonatiĝi Esperanton al tiuj, kiuj deziras malkovri ĝin,
- babili inter ni pri diversaj okazaĵoj, aŭ pri iu definitiva temo kiel ekzerco de praktikado,
- pasi distran tempon en amika etoso... Oni povas surloke mendi vespermanĝaĵon, aŭ simple trinkaĵon. (...)

Mi mem, elveninte el la kongreso en Boulogne, omaĝe al la centjaro de la unua Esperanta kongreso, mi ŝatus disdoni al vi miajn impresojn kaj proponojn.

Krome, ni parolos pri la venonta piedkuro en Saint-Valéry tra la golfeto de la Somme, kiu okazos la Dimanĉon 19an de Junio; ne malfru u inskribi vin!

Do, mi diras al vi «ĝis baldaŭ», esperante vidi vin baldaŭ, aŭ ricevi mesaĝon de vi.

Vincent Courouble  
*courouble.vincent ĉe neuf.fr*

## Demandoj kaj proponoj de Marc Anselmi

En Esperanto: Ne timu pri EDE!

Ĉu vi volas partopreni al ebla kunveno en Arras antaŭ la 22a de majo?

Mi ne komprenas kial la nordokcidentaj francoj ne volas helpi EDE. Eŭropo Demokratio Esperanto volas nur partopreni en la eŭropaj balotoj. Iuj esperantistoj pensas ke EDE malutiligas la klopodojn de iuj aktivuloj kiuj provas ŝanĝi la lingvajn leĝojn. Iuj lokaj politikistoj movetas. Sed la profesiaj politikistestroj ne moviĝis, ne moviĝas kaj eble ne moviĝos por nia «ideo»! Mi ne pensas ke 0,03 % en Nordokcidento kaj 0,15 % en aliaj francaj regionoj timigas la politikistojn. Cetere, ni redonos niajn balotvoĉetojn al amikaj partioj en la aliaj, naciaj, gravaj balotegoj. Dum la eŭropaj balotoj, estas okazo por paroli pri la lingvaj problemoj.

En la asocio EDE Nord-Okcidento, oni laboras multe nur dum eŭropaj balotoj.

Dum la aliaj momentoj, oni babilas multe per la reto. Cetere, se vi volas babili senpage kun fremdaj samideanoj pri EDE, vi povas aliĝi en la forumo: [europabaloto@yahoo.com](mailto:europabaloto@yahoo.com). Mi rediras al vi, ne timu pri EDE. Eble estas la nura okazo paroli pri la Eŭropaj, Demokratiaj, Esperantaj problemoj en naciaj kaj internaciaj gazetaĵoj, radioelsendoj, televido. En la eŭropaj

balotoj, la popolo legus nian seriozan «ideon» en la balota flugfolio.

Ĉu Esperanto 80 akceptus inviti unu aŭ du EDE-membrojn por prezenti nia asocio EDE Nord-Ouest dum via kurso aŭ post via kurso? Se jes, kiam? (Vi povas proponi plurajn datojn).

Marc ANSELM

*Kasisto de EDE Nord-Okcidento*

En Français: Appel aux membres d'EDE Nord-Ouest et autres amis espérantistes.

À côté de l'appel lancé par Yves Bachimont concernant notre AG du 22 mai 2005, j'aimerais organiser sur Arras, avant cette date, une réunion «physique» ouverte à tous. (Je me suis renseigné, la salle et le parking seront gratuits). Pendant cette réunion, on pourra parler de l'AG et bien sûr du mouvement EDE en particulier. J'aimerais avoir un avis sur un maximum de personnes (disponibilité, covoiturage, horaires, jours, etc.). Je peux organiser cette réunion soit un soir après 19H dans la semaine, soit un jour de Week-End comme par exemple avant ou après la conférence «Moresnet» qui aura lieu le 7 mai (organisée par Arras-Espéranto).

Je suis disponible à toutes vos remarques.

Marc ANSELM

*Trésorier d'EDE Nord-Ouest  
marcjoantom ĉe club-internet.fr*

## Jean-Claude a été invité par la Fédération des Associations d'Étudiants Picards à l'occasion d'une rencontre café-débat dans le cadre des «Amphis d'Europe» pour parler d'Espéranto

### Jean-Claude renkontis gestudentojn

En Esperanto: Kadre de debatoj pri Eŭropo (baldaŭna referendumo), en Amieno (...) mi renkontis gestudentojn, kiuj interesiĝas pri nia lingvo. La debato estis: «Espéranto, Ĉu eŭropa lingvo?» kaj kompreneble oni invitis min. Malmultaj partoprenis sed la partoprenantaro bone interesiĝis, do des pli bone. Ĉeestis:

– Natacha, prezidantino de «faep» t.e. la Fédération des Associations d'Étudiants Picards.

– Stéphane studas kaj loĝas ĉefe en Parizo kaj li vere volas lerni la lingvon.

– Cécile interesiĝas pri nia lingvo.

*Jean-Claude Roy*

## Ĉina Universitato informas en Esperanto

En Esperanto:

La retpaĝaro de Ĉina Universitato de Fremdaj Aferoj kaj Ekonomio en Pekino ofertas informojn kaj informas pri si ankaŭ en Esperanto.

La retpaĝaro ofertas ne nur simplajn informojn pri la universitato, sed ĝi enhavas proprajn angulojn por aktualaj informoj, forumo kaj por Esperanto-novajoj.

Ĝojiga estas la uzo de Esperanto en la paĝoj, ĉar krom la internacia lingvo estas uzataj nur tri aliaj: ĉina, angla kaj japana.

*Nun tra la TTT-ejo de EsperantoLand.org*

## Kontraŭdiskriminacia kampanjo en Eŭropa Parlamento per Esperanto

En Esperanto:

Eŭropaj esperantistoj per siaj organizoj organizas kampanjon kontraŭ lingva diskriminacio en la Eŭropa Parlamento. Enkadre de la aktivaĵo ĉiuj parlamentanoj ricevos informojn pri ekzistanta lingva diskriminacio.

La ĉefa punkto de la kampanjo estas bazita al la fakto, ke eŭropaj instancoj mem diskriminacias tiujn, kiuj denaske parolas la anglan lingvon.

La tradukaĵoj de la informilo pretiĝos per helpo de diverslandaj esperantistoj.

*El diversaj fontoj tra TTT-ejo de EsperantoLand.org*

## Esperanto — tradukilo por la infana diplomatio

En Esperanto:

Vicprezidantino de la kroata registaro kaj ministrino pri familoj, Jadranka Kosor, aĉetis la originalan, kroatan infalibron «Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapic» por japanaj infanoj, kiu estis tradukita al la japana pere de Esperanto.

*El landa-agado tra TTT-ejo de EsperantoLand.org*

## Tutpaĝe pri UK en Litovio

En Esperanto:

En litova, tutlanda taggazeto «Lietuvos aidas» la 30-an de marto aperis tutpaĝa, litovlingva artikolo sur la 9-a paĝo pri la prepariĝoj de litovaj esperantistoj al la Universala Kongreso, kiu okazos somere en Litovio.

La artikolo temis pri Esperanto ĝenerale kaj multe okupiĝis pri Universalaj Kongresoj kaj aktivaĵoj de litovaj esperantistoj.

### Radio parolis ankaŭ pri Esperanto

La saman tagon la litova, nacia radielsendo plurfoja resumis la artikolon en siaj traĵoj pri taga gazetaro.

*El esper-inform tra TTT-ejo de EsperantoLand.org*